

ZPRÁVY

ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

Ročník X Číslo 1 (29) Osvětový ústav v Praze

Květen 1968

NI SALUTIS LA NOVAN EPOKON

Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato ĉe Kleriga Instituto en Prago, Esperantista Klubo en Praga, Konsultiĝa Komitato por Esperanto ĉe Kleriga Instituto en Bratislava, sendis salutleterojn al Prezidento Ludoviko S v o b o d a, al la I-a sekretario de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio A. Dubček kaj al la I-a sekretario de Kompartio en Slovakia Vasil Biľak respektive. Krome ankaŭ la Konsultiĝa komitato ĉe Regiona Kultur-centro en Banská Bystrica al Slovaka Nacia Konsilantaro.

Kiel patriotoj-esperantistoj en ĉiuj ni esprimis nian ĝojon kaj apogon al la renaskiga procezo. La honestaj esperantistoj ekde la liberigo de Nia Respubliko klopodis bone propagandi ĝiajn socialismajn atingajojn, kulturon kaj naturbelaĵojn.

Bedaŭrinde komence de la 50-aj jaroj la memstara Asocio estis likvidita kaj la esperantista preso ĉesigita.

En ĉiuj leteroj ni promesis ankoraŭ pli intense eluzi Esperanton por vera informado de eksterlando pri la okazaĵoj en nia Respubliko kaj en la lukto por la tutmonda paco.

Samtempe ni petis niajn ŝtatajn kaj politikajn gvidantojn pri komprenemo kaj subteno de nia ideala libervola movado por povi forigi la obstaklojn, kiuj ankoraŭ baras la vojon al la renovigo de nia memstara esperantista organizaĵo kun propra preso.

Na cestě před cílem

Je všeobecně známo, že druhý Československý esperantský výbor, ustavený ministerstvem školství a kultury a Osvětovým ústavem v Praze, počátkem roku 1965, zaměřil svoji činnost podle vyhlášeného „Akčního plánu“ na další mobilizaci všech československých esperantistů k aktivní a cílevědomé práci pro rozšíření členské základny E-kroužků a uplatňování esperanta — v souladu se zájmy naší socialistické republiky — ve všech oborech lidské činnosti, zejména na poli mírového hnutí a v mezinárodních stycích vůbec. Cílem bylo vytvoření a zajištění předpokladů pro obnovení samostatné esperantské organizace.

Společnou práci ČSEV, jeho sekcí a komisí a četných E-kroužků podařilo se nám — i při daných omezených možnostech a často nepochopení či nedostacích ve vlastních řadách — docílit poměrně dobrých výsledků. Aktivita esperantistů v posledních 3 letech podstatně vzrostla, zvýšil se počet E-kroužků i jejich registrovaných členů. Významnou činnost rozvinula sekce MEM, vyrostla mohutná,

samostatně pracující sekce železničářů, mimořádně agilní a výkonná sekce mládeže i řada dalších odborných sekcí. Díky za to patří mnoha schopným a obětavým funkcionářům, kteří správně pochopili oč jde a neustoupili před četnými nesnáze.

V posledních 2 letech projevil se vzestup aktivity výrazně i na Slovensku jako důsledek soustavné organizační, odborné a propagační práce tamních vedoucích funkcionářů. Tento rozmach hnutí, růst počtu kroužků a množství kursů dospěl počátkem letošního roku k ustavení Poradního sboru pro esperanto a E-kroužky na Slovensku při Osvětovém ústavu v Bratislavě. (V tomto smyslu bylo jednáno a přijato doporučení již plenárním zasedáním ČSEV a setkáním esperantistů Středoslovenského a Východoslovenského kraje v květnu 1966 ve St. Smokovci.)

Důležitou úlohu v rozvoji E-hnutí hrála publikační a ediční činnost ČSEV. Tiskový orgán — Zprávy ČSEV vycházely, i když s velkými potížemi a zpožděním, přece bez přerušení v rozsahu 4 čísel ročně; pak přibyla pravidelná E-rubrika v časopisu „Neděle“, jež nyní má četné následovníky. Čs. vydání mezinárodního mírového časopisu „Paco“, vycházejí 2 X ročně. Z podnětu a za spolupráce ČSEV byly vydávány učebnice a slovníky, jakož i řada informačních publikací v esperantu.

Vzestup aktivity hnutí projevoval se ve stále větším zájmu o tradiční letní tábory a kursy esperanta v Lančově i o kursy organizované E-kroužky. Byly pořádány různé konference, semináře a setkání, z nichž největšího úspěchu dosáhl svým významem loňský Esperantský kulturní festival v rámci jubilejních oslav P. Bezruče v Opavě.

V souladu s docilovanými výsledky zpracoval ČSEV a jeho komise již v roce 1966 rozsáhlý rozborový materiál o současné situaci a požadavcích čs. esperantského hnutí, který byl předložen ministerstvu školství a kultury k projednání. Následovalo vypracování konkrétních návrhů na ustavení nové samostatné organizace včetně předběžného návrhu stanov.

Tyto dokumenty, jejichž komplexní vypracování si vyžádalo stovky hodin řady odborných pracovníků, byly prostřednictvím Osvětového ústavu v Praze předloženy koncem roku 1967 ministerstvu kultury a informací i ministerstvu vnitra k předběžné informaci a staly se předmětem několika jednání zástupců ČSEV a OÚ na uvedených ministerstvech. Při tom je nutno s díky kvitovat velmi příznivé stanovisko vedení OÚ v Praze a jeho pracovníků, kteří zejména od minulého roku a dosud poskytují ČSEV v této věci plnou morální, odbornou, finanční i osobní podporu. MKI však s řešením vyčkávalo vzhledem k připravovanému novému zákonu o právu spolčovacím.

Do vývoje přípravných prací zasáhl proto velmi vítaně proces demokratizace našeho veřejného života, zahájený usnesením lednového pléna ÚV KSČ. Mezitím ředitel OÚ v Praze po předchozích konzultacích prodloužil dopisem z 9. 3. t. r. funkční období dosavadních členů ČSEV na dobu do ustavení orgánů nové organizace.

Nově vzniklou situací, která skýtá též našemu esperantskému hnutí mimořádně příznivé podmínky k brzkému obnovení samostatné organizace, zabývalo se zevrubně první plénem ČSEV dne 16. 3. tr. i schůze předsednictva dne 3. 4. tr. Na nich byly přijaty konkrétní závěry a usnesení. Dopisem ze svého prvního pléna vyjádřil ČSEV prvnímu tajemníkovi ÚV KSČ s. Alexandru Dubčekovi bezvýhradný a spontánní souhlas čs. esperantistů k závěrům z lednového pléna. Ze schůze

předsednictva byla odeslána zdravice prezidentu republiky s. Ludvíku Svobodovi s blahopřáním k jeho zvolení prezidentem. Oběma nejvyšším představitelům jsme se mj. zmínili i o našich problémech a požádali je o podporu.

V dřívějším návrhu na ustavení Čs. esperantského svazu a jeho stanov nebyly ještě plně uplatněny zásady, které by odpovídaly novým podmínkám v duchu probíhající demokratizace a přijatého akčního programu strany. Bylo proto rozhodnuto o jejich urychleném přepracování a o svolání společného zasedání ČSEV a Poradního sboru pro esperanto na Slovensku za účelem projednání jednotných zásad nových stanov na federativním základě.

Na 2. plenárním zasedání ČSEV a společné schůzi s Poradním sborem pro esperanto na Slovensku ve dnech 18. a 19. května 1968 v Brně projednávaly a schválily tyto orgány:

1. Návrh na **rozšířené pracovní předsednictvo ČSEV**. Toto opatření bylo provedeno ve spolupráci s Osvětovým ústavem v Praze a Osvětovým ústavem v Bratislavě. Rozšířené předsednictvo ČSEV má zároveň fungovat **jako přípravný výbor** pro ustavení samostatné esperantské organizace.

2. **Návrhy stanov** Českého esperantského svazu, Zvazu esperantistov na Slovensku a Československé esperantské federace, jejímiž kolektivními členy budou zatím oba národní svazy a Svaz mladých esperantistů. Návrhy stanov budou, po zapracování přijatých změn a doplňků, předloženy odborným expertům k definitivní úpravě s hlediska právně-legislativního a jazykového. Podle možnosti budou pak publikovány k informaci E-kroužků.

3. Se svoláním ustavujícího sjezdu delegátů se počítá předběžně na podzim 1968 do Brna.

Obracíme se na všechny E-kroužky, sekce a komise i všechny jednotlivé esperantisty s výzvou, aby v tomto rozhodujícím stadiu vyvinuly maximální vlastní účelnou aktivitu a spolupráci s přípravným výborem, jehož úkoly jsou velmi náročné a pracné. Bez této podpory byla by jeho činnost bezvýsledná.

Jen za spontánní a jednotné spolupráce celého čs. esperantského hnutí ve shodě s postupujícím obrodným procesem v naší socialistické společnosti můžeme dosáhnout dlouho očekávaného a žádoucího cíle!

Survoje al la celo

(Resumeto de la apuda artikolo)

La II-a ĈS E-Komitato, starigita komence de 1965 ĉe Kleriga Instituto en Prago — laŭ la senco de sia agad-programo — tuj komencis la pluan mobilizon de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj en ĉiuj sferoj de la homa agado. Ekestis nombraj fakaj sekcioj, bone funkciantaj. Senĉese kreskas la intereso pri esperantistaj renkontiĝoj, tendaroj, seminarioj. Aperadas novaj priesperantaj rubrikoj en gazetoj, radio. Tio estas jam solida bazo sur kiu povas esti pritraktata la renovigita organizo, sed konformanta al la reformo de la ŝtata konstitucio. Laŭ tio ni havos du naciajn organizaĵojn: Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de Esperantistoj en Slovakio estos kolektivaj membroj de la tutŝtata Ĉeĥoslovaka Esperanto-Federacio.

La fonda kunveno de la delegitoj okazos aŭtune en Brno, kie la 18— 19-an de majo ĉi-jara la unuopajn statutproponojn pritraktis la membroj de ĈSEK kun tiuj de Konsultiĝa Komisiono por Esperanto ĉe la Kleriga Instituto en Bratislava.

La plivastigita estraro de ĈSEK fariĝis Preparkomitato por la memstara esperantista organizaĵo en Ĉeĥoslovakio. Tial ĈSEK insiste petas la kunlaboron de ĉiuj rondetoj, sekcioj, komisionoj kaj unupuloj en ĉi tiu decida stadio.

Mortis Francisko Jakubec.

La 23-an de marto forpasis en Brno la 74-jara konata fidela esperantisto. Dum 40 jaroj li aktivis en la movado, gvidante kursojn, tradukante esperant- kaj nacilingven. Speciale ni menciuj du belajn ekspoziciojn pri Lingvo Internacia en Brno-Židenice, kiujn li mem preparis kaj ĉe kiuj li ĉiutage deĵoris. Kiel bona gitarludanto kun agrabla voĉo li ofte vigligis la klubajn vesperojn. Lian helpemon kaj bonkorecon, krom grandaj spertoj, ni ĉiam rememoros, kaj lian forpason ni ege bedaŭras: Al lia edzino, poetino Milda Jakubcová ni esprimas nian plej profundan kondolencon.

J. V.

Esperantista Printempo en Altaj Tatroj en 1969.

Slovaka Esperanto-Instituto en Martin intertraktas kun Ĉedok en Starý Smokovec pri 1-semajna restado por 40 esperantistoj, sportŝatantoj el la tuta Respubliko, dum la ferioj en marto 1969, en la montara hotelo Ždiaranka en la tipa gorala (montarana) vilaĝo Ždiar. La prezo estos proks. Kĉs 450.— por persono, kun asekuro. Interesuloj skribu jam nun je adreso: Esperanto poŝtfako 80, MARTIN.

JUBILEO DE SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

Pasis jam 50 jaroj, kiam aro da skoltoj-esperantistoj fondis internacian organizon de skoltoj, scipovantaj Esperanton. Tio okazis dum la unua mondmilito en la urbeto Ransart en Francio, post granda batalo, kie la fondinto Avoto renkontis aliajn skoltojn-esperantistojn, tiam soldatojn.

Nuntempe SEL havas reprezentantojn nur en 15 landoj. Ni skoltoj-esperantistoj en Ĉeĥoslovakio, kiuj reprezentis unu el la plej fortaj naciaj sekcioj de SEL — kun preskaŭ 500 membroj — devis en 1952 eksilenti.

Karaj estintaj SEL-anoj: se vi sentas vin kapablaj gvidi skoltan trupon, ne hezitu — nia movado bezonas multe da bonaj trupestroj. Nur tiel ni helpos ankaŭ al nia movado kaj efektiviĝos nian iaman celon „10 000 da junaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio.”

Se ni revivigus Esperanto-fakon ĉe JUNÁK, ni devus poste havi bonajn laborgrupojn. Mi helpos al vi. Vi trovos min je la malnova adreso: St. Lešinger (65-jarulo), Praha 4, Pankrác, M. Cibulkové 34. Estu pretaj!

DU INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ

Aŭguste 1957 mi komencis mian bibliotekistan okupon en Postgradua Medicina Instituto en Prago. Mi estis antaŭe okupita jam en diversaj bibliotekoj, sed en medicina biblioteko mi ekokupiĝis unuafoje. Tial mi devis konatiĝi kun specifo de medicinaj bibliotekoj ĝenerale, kaj de tiu instituto speciale, ĉar ĝi havis kaj havas ekstran lokon inter sanitaraj kaj medicinaj institutoj de nia respubliko.

La Postgradua Medicina Instituto (nun Instituto por pluklerigado de Kuracistoj kaj Farmaciistoj) ne estas institucio, kiu praktikas medicinan sanzorgon kaj profilaktikon por laboruloj kiel aliaj sanasekuraj entreprenoj, subigitaj al distrikta, regiona kaj landa administroj. Ĝi estas lerneja aranĝo de Ministerio por Publika Sano, kiu zorgas pri postpromocia, specialiga kaj plua faka edukado de kuracistoj, jam havintaj pregraduan erudicion ĉe medicinaj fakultatoj de alternejoj kaj tri-, kvar- aŭ plijaran praktikon en certa medicina fako. Ĝi estis fondita la 1-an de julio 1953 laŭ la dekreto de la Ministerio kun tasko unuigi ĝis tiam neunuecan kaj nekompletan postgraduan edukon de kuracistoj. Ĝi estas kompletiginta kaj anstataŭiginta mallongdaŭrajn specialigajn kursojn, kiuj ekde la j. 1946 praktikis postpromocian klerigadon de kuracistoj. La biblioteko de la instituto servis kaj servas do same al instruistaro (t. e. profesoroj, docentoj kaj asistantoj) de la pluklerigaj kursoj, kiel al instruatoj-kuracistoj, kiuj trapasas unu el la edukformoj (kursoj, instruad-lokoj en klinikoj), tiel ankaŭ al kuracista kaj medicinista publiko ĝenerale por memstara kleriĝado. La lastan celon oni plenumas plejparte per interbibliotekaj pruntoj el la institutaj fondusoj.

Simila instituto neniam antaŭe ekzistis kaj funkciis en Ĉeĥoslovaka Respubliko, do ne estis por ĝia laboro kaj funkciado iaj receptoj kaj modeloj. Estis necese konatiĝi kun modeloj eksterlandaj, unue en Soveta Unio. Unuavice tion plenumis oficialaj informoj el vojaĝoj de ŝtataj delegacioj, poste intervizitoj de sovetaj kaj popol-demokratiaj postgraduj medicinaj laboruloj ĉe ni kaj de la estraro de la ĉeĥoslovaka instituto en similaj institutoj en Moskvo, Leningrado, Kievo, Varsovio, Sofio, Berlino, Bukareŝto, Budapeŝto kaj aliloke; fine eĉ rilatoj kun laboruloj de postgraduj medicin-institutoj en kapitalismaj landoj.

Ĉar vizitoj kaj renkontiĝoj de unuopaj fakuloj ne sufiĉis, en la j. 1958 okazis la I-a Simpozio de Postgraduj Medicinaj Institutoj de USSR kaj socialismaj ŝtatoj. Ĝi estis instalita laŭ la decido de Konferenco de Ministroj por Publika Sano, okazinta en Bukareŝto en 1957. Do en Aŭgusto 1958 nia instituto en Prago laŭ tiu sugesto ĝin aranĝis. Partoprenis pli ol 300 oficialaj kaj neoficialaj delegitoj el Sovet-Unio, Bulgario, Ĉinio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Mongolio, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio kaj kelkdeko da gastoj el la landoj kun neplanata ekonomia sistemo, t. e. el okcidenta sfero (Britio, Aŭstrio, Danlando, Germana Federacia Respubliko, Francio, Nederlando, Svedio, Svislando, Usono ktp.).

Ĉe preparoj kaj organizaj laboroj por la simpozio helpis ĉiuj okupitoj de la instituto inkluzive la administrajn oficistojn kaj teknikistojn. Eĉ estis necese lui pluajn kapablajn laborulojn por teknikaj sektoroj (traduk-kajutoj, sonbendaj aparatoj, mikrofonoj, distribuaj instalaĵoj k.s.) kaj tradukistojn-interpretistojn. Tion la instituto

malfacile kovris el sia buĝeto, kvankam ĝi ricevis eksterordinaran subvencion de la Ministerio. La referaĵoj — prelegoj kaj diskutoj — okazis en apuda Medicina Higiena Fakultato, oferinta tiucele sian plej grandan aŭditorion kaj tie estis lokitaj la ĉefaj teknikaj instalaĵoj kun la interpretistoj. En la instituto mem estis ja organiza stabo, kiu de malantaŭo gvidis la tutan simpozion, kaj flanka tradukista rondo, kiu laboris en fono de la afero.

Mi estis envicigita kiel tradukantino el la rusa lingvo, kune kun mia edzo, kiu kunlaboris de ekstere. Nia funkcio estis: nokte tradukadi la prezentitajn referaĵojn de unuopaj delegitoj, kiuj elektis la rusan lingvon kiel parolan. Poste post la kontrolo kaj lingva aprobo oni ĉion nete tajpis al stenciloj kaj la tekstoj tuj nokte estis multobligitaj por povi la sekvan matenon jam kuŝi sur la pupitroj de ĉeĥoslovakaj delegitoj, en la aŭditorio. La ĉeĥigitaj tekstoj servis do al niaj delegitoj simpozianoj kiel bazo de iliaj propraj diskut-kontribuaĵoj. La nokta laboro estis elĉerpiga kaj streĉa. Post tia punkto ni preskaŭ falis pro lacego kaj da ili estis kelkaj. La tradukoj devis esti precizaj kaj rapidaj, dume la submetita ruslingva materialo, nome la kontribuaĵoj de referantoj el Ĉinio kaj Hungario, estis tute neperfektaj laŭ lingva vidpunkto. Ilia stilo estis malbonkvalita kaj la nivelo tia, ke ĝi nin ofte longe cerbumigis, ĉar ni ne povis kapti la ĝustan sencon de la frazoj, kaj pene devis solvi la esprimitajn ideojn. La mizera stilistiko manifestiĝis ofte en parolkontribuaĵoj de la neslavaj lingvanoj, kiuj nesufiĉe penetris en la lingvan spiriton, ĉar la slava animo estis al ili tute fremda, kvankam alie ili regis la lingvon bone.

La elrusaj tradukantoj ja ne estis solaj. Ĉe la simpozia stabo laboris ankaŭ aliaj tradukantaj grupoj, kiuj disvolvidis febran funkciadon dumnokte, ekz. el la germana, angla, resp. aliaj lingvoj. Tio ĉi okazis nur en la fono, dumtage la febra laboro ŝanĝis sian lokon kaj paradis antaŭ la okuloj kaj oreloj de la simpozianoj en la aŭditorio. La traduk-kajutoj, plenŝtopitaj de alte kvalifikitaj tradukistoj-interpretistoj, servis per sia funkciado al simultanaj tradukoj rekte dum la traktadoj.

Tiel, kiel ni ofte vidas en kinejoj kaj sur televid-ekranoj en aktualaj ŝotoj (film-fotoj, fota rigardo de filma kamero) el diversaj internaciaj konferencoj kaj kunsidoj, la delegitoj kun aŭdiloj sur oreloj, mergitaj sur apogseĝoj, sekvis la referantojn en la lingvo, kiu estis al ili konata, tamen ofte neestante kapablaj tuj en la sekva diskuto montri sian opinion en la koncerna lingvo. Dum paŭzoj kaj interrompaj momentoj la simpozianoj grupiĝis, promenis en grupoj tra koridoroj, diskutante kaj disputante, ariĝis ĉe bufedo, svarmis. Multaj el ili serĉis helpon de tradukistinoj, kiuj sufiĉe nombraj estis je ilia dispono, tamen nepovante kontentigi ĉiujn. La ĉina delegacio venigis kun si sian interpretiston, sed lia rusa lingvo estis apenaŭ komprenebla al neĉinoj. Kun uzo de elangla interpretisto la ĉinoj tamen atingis la eblon trarigardi la kanstruaĵon de nia instituto, observi ĝian bibliotekon kaj legejon kun studejo, kaj aliajn atributajn ejojn. Sed kontaktante unu kun la alia, la ĉinoj devis uzi surpaperigitan hieroglifan skribon, ĉar ili apartenis al diferencaj etnaj grupoj. Tiam mi unufoje eksciis kun miro, ke la diferenco inter ŝanhaja kaj pekina dialektoj estas tiel granda, kvazaŭ ambaŭ ĉinoj estus parolintaj per tute memstara, fremda lingvo!

Malgraŭ tiuj ĉi mankoj, kiuj en interpersonaj rilatoj de unuopaj simpozianoj certe bremsis la agemon, la rezultoj de la simpozio estis valoraj. Ili validas ĝis nun kaj la principoj, tiam esprimitaj por altiĝ-tendenca linio de postpromocia klerigado de

kuracistoj en socialismaj landoj, penetras ĉiam pli kaj pli ankaŭ sur la teritorion de Monda San-Organizaĵo.



Ĉu vi rememoras ilin? Dum la pasintjara Kulturfestivalo en Opava salutis ankaŭ eksterlandaj gastoj. Kvankam la karikaturo de Tibor Gaál el Žitavice apud Vráble, estis desegnita nur per kolora inka krajono, tamen oni sukcesis represi ĝin. Temas pri ges-anoj Genov, Mc Lennon, Burmeister, D-ro Zlatnar, Tuinder, Dr. Koziol, A. Gusev kaj s-rino Whiteker.

La nova hotelo „Esperanto” en Pribylina sub Altaj Tatroj, estas envicigita en la kategorion „B”. Ĝi ampleksas 60 litojn, centran hejtadon, lifton, restoracion kaj kafejon en la III-a prezgrupo. Pri pluaj detaloj demandu Esperanto-rondeton ĉe Muzeo de Janko Král’ en Liptovský Mikuláš.

Propagandajn ilustritajn poŝtkartojn eldonis lastatempe A. Berka en Vsetín, A. Satték en Příbor kaj la Tutŝtata Ekspozicio „Ostrava 68”.

Internacian renkontiĝon por esperantistoj-naturamikoj aranĝos la esperantistoj de la hungara urbo Pécs (pééc — kun fermita „e”), konata de post la 22-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en 1966, en Abaliget (= arbareto de Aba), je 19-kma distanco de Pécs. Ĝi okazos de 20.7. ĝis 30.7.1968 en unuaranga kampadejo. La organizantoj zorgos ne nur pri la kutimaj someraj amuzaĵoj (banado, sunumado, remado ktp.), sed ankaŭ pri varia programo. La kotizoj estas Forintoj de 650.— ĝis 850. — laŭ la tipo de la loĝejo (en kunportitaj tendoj, turista gastejo aŭ en lignaj dometoj, inkluzive la manĝaĵon). Pluajn kaj detalajn informojn tre volonte donos la Organiza Komitato PECS 1, poŝtfako 2, Hungario.

Konsultajn horojn por interesuloj pri Esperanto enkondukis jam kelkaj slovakiaj rondetoj. Inter la unuaj anonciĝis Žilina, Martin kaj Liptovský Mikuláš. La konsultaj horoj estas publikigataj en la lokaj gazetoj kaj okazadas unufoje semajne, ĉefe dum la rondet-kunvenoj.

ALMANAKO PRI GEOLOGIO INTERNACIA

En la dua kvaronjaro 1968 aperos esperantlingva almanako GEOLOGIO INTERNACIA, dediĉita al la Internacia Geologia Kongreso en Prago. Ĝi enhavos originalajn kontribuojn de diverslandaj geologoj, skribitajn en Esperanto, kun la koncernaj resumoj nacilingvaj. La almanako en amplekso 160 paĝoj, en la formato A5, koston Kĉs 16.—.

Pere de Geologio Internacia estas eble aboni ankaŭ la esperantlingvan periodaĵon KEMIO INTERNACIA, aperadanta en Urugvajo, por favora prezo Kĉs 8. — Jare aperas 3 kajeroj.

Ambaŭ publikaĵojn vi povas aboni ĉe: Geologický průzkum n. p. Praha, odd. spec. geolog. výzkumů, Wolkerova 1, PRAHA 6 — Bubeneč.

Kongreso pri „Moderna Lernejo” okazis en la franca urbo Pau ekde la 9-a ĝis la 12-a de aprilo 1968. Ĝi pritraktis interlernejan korespodadon, la t. n. Freinet-metodon, pedagogiajn temojn k. s.

Zasedání pléna a předsednictva ČSEV

- a) Zasedání pléna ČSEV se koná čtvrtletně
- b) Zasedání předsednictva se koná šestkrát v roce

c) Pracovní schůzky užšího předsednictva se konají podle potřeby

Plenární zasedání:

1. březen — Praha, 2. květen — Brno, 3. září — Vsetín, 4. prosinec — Starý Smokovec.

La eldiro de V. I. Lenin pri Esperanto dum la 8-a UKE en Krakovo 1912

Neologismoj subfosas Esperanton. Alvoko de Aŭstria Esperanto-Instituto.

Rakouský esperantský ústav (AEI) doporučuje 1. používat přednostně slov oficiálních a základních, 2. nepoužívat nových výrazů pro složená slova, především s předponou mal-. AEI žádá o uveřejnění této výzvy, když Akademie esperanta dosud v této věci nezaujala stanovisko.

Aktuala Terminareto. Esprimoj komunlingvaj.

Germ. Esp. Rev. 20, 1967 IV, n-o 4, p. 38

Další část německo-esperantského slovníčku aktuálních výrazů z pera Hanse Wingena, tentokrát věnovaná slovním obrátům a obrazným vyjádřením (např. Eiertanz = provo ofendi neniun).

I. Škapa: **Novaj, nekonataj materialoj pri Maksim Gorkij kaj Esperanto. La estonto apartenas al Esperanto.** Internacia Ĵurnalistoj 11, 1967 I/III, n-o 1, p. 2-3

Líčení rozmluvy několika přátel s Gorkým, která ukazuje jednoznačně kladný postoj Gorkého k esperantu. Odmítá argument odpůrců esperanta o „umělosti“: „Celá naše kultura je umělá, a právě proto nám výborně slouží, ne?“

Elizabeto Kis — Imre Szenes: **Sur larĝaj vojoj — per novaj metodoj.** (Pri organizo de internacia gazetara konkurso.)

Internacia Ĵurnalistoj 11, 1967 I/III, n-o 1, p. 6-7

Návrh, jak získat neesperantské novináře pro hnutí: soutěž 1. o zkušenostech z mezinárodního života (otázky jazykové, komunikační, o špatných překladech), 2. o vlastním návrhu, jak tuto otázku řešit. Příspěvky by posoudila porota, odměnou by bylo 20-25 pobytů v zahraničí. Členové TEJA se mají k návrhu vyjádřit.

Ĉu V. I. Lenin rilatis favore al Esperanto?

Esperanto-rondeto ĉe Domo de Pioniroj en Martin salutis la plej maljunajn esperantistojn, kiel Martin Benka, Karolo Cibur, A. D. Kremer kaj el inter la eksterlandanoj Ints Caĉe en Pumpuri. Je la demando, kiajn interrilatojn li havis kun Vlad. Iljiĉ Lenin, li respondis per tuta prelegserio. Ni aperigos almenaŭ la ĉefajn partojn de liaj asertoj, devenantaj de antaŭ duonjarcento.

R E M E M O R O J

de Ints Caçe

pri siaj 18-fojaj renkontiĝoj kun VLADIMIR ILJIĈ LENIN!


La Granda Oktobra Revolucio trovis min kiel:

- a) Klubestron de 1500 venontaj oficiroj en Konstantinova Artileria Lernejo;
- b) Eksteretatan instruiston por geografio kaj geometrio en Petrograda Blindula Instituto;
- c) Sekretarion de Petrograda Esperanto-Societo „ESPERO“.

Ekkonis mi la lingvon Esperanto kiel dekunujara knabo-lernanto kaj jam 60 jarojn mi honore portadas la Verdajn Esperanto-Stelon, kiun siatempe al mi donacis persone la Aŭtoro mem de la Internacia lingvo ESPERANTO — en Ruslando loĝanta okulisto — Doktoro Lazaro Ludoviko Zamenhof.

KONSTANTINOVA Artileria Lernejo — unika en sia branĉo en tuta Ruslando — poste estis baptita je Unuaj Artileriaj Kursoj kaj kiu nun nomiĝas Artileria Akademio je nomo de Frunze, situas en Leningrado laŭ Zabalkanskij prospekt Nr. 17. — Tie mi servis kiel militisto OK JAROJN KAJ OK MONATOJN seninterrompe.

En la momento de la Revolucio de mi gvidatajn Esperanto-kursojn partoprenis 213 kadetoj. Inter ili estis multaj tre elstaraj. Ekzemple: studento de jura fakultato KRILENKO, kiu poste iĝis ĉefprokuroro en Sovetunio — ĝis la jaro 1936 (li iĝis viktimo de la persona kulto); studento-kaŭkazano Dĵikija — poste iĝis estro de ses superaj militistaj altlernejoj; ŝipano el Revolucia Kronŝtato Ivanov, kiu poste iĝis politika komisaro en la sama lernejo.



La eldiro de V. I. Lenin pri Esperanto dum la 8-a UKE en Krakovo 1912

Nokte de 22-a al 23-a de Oktobre 1917 — malnova stilo — mi sukcesis provizi miajn tri fidelajn disĉipiojn per dokumentoj kaj civila vestaĵo kaj lasis ilin sekrete tra 2 m alta mura barilo de la Artileria lernejo ...

En la terure-timiga nokto mi libervole prenis sur min la noktan militan deĵoradon ĉe la ĉefa pordo de la lernejo en foajo de la parada ŝtuparo. La nobelaro de Konstantinova Artileria lernejo — la oficiraro — estis en granda kaj eĉ en terura embaraso. Kelkajn militajn lernejojn en antaŭa tago oni ŝturme atakegis kun sangaelverŝado.

Ĉirkaŭ noktmezo dum mia deĵorado venis la unuaj ŝturmantoj al KONSTANTINOVA Artileria lernejo...

La pezajn kverkajn pordojn mi jam estis malŝlosinta.

Pro tio sen peno en fendo de la pordo aperis samtempe tri bajonetoj de la pafilo „Berdanka“. Mi komandis: „Voljno!“ („Libere“) kaj anoncis al la ankoraŭ nevideblaj ŝturmantoj = bravuloj ke la vojo estas libera kaj en la lernejo ĉio estas en plej bona ordo.

La pordo malfermiĝis kaj la sojlon sammomente trapaŝis tri bravaj soldatoj. Post ili kiel la kvara estis al ni jam konata Krilenko, sed apud li paŝis la kuraĝa ŝipano

el ribela Kronŝtadto kamarado IVANOV Ivan Ivanoviĉ — ambaŭ tenante en la manoj po revolvero. Mi amike intersalutiĝadis kiel kun la fremdaj soldatoj, same kun miaj antaŭhieraŭaj kursanoj. Evidentiĝis ke la tuta lernejo je flanko de la prospekto Zabalkanskij, same je flanko de la kanalo Fontanka estas sieĝata. — Kamarado Krilenko ordonis la lernejon de ekstero dume ankoraŭ gardadi, sed ke la ceteraj armeanoj venu kontroli la longajn koridorojn kaj la klasojn.

Tiel Konstantinova Artileria lernejo — kie pasis tuta mia juneco — estis ekposedata sen unu guteto da sango!

Antaŭ paro da tagoj estinta junkro = kadeto = kursano KRILENKO prezentis al Direktoro de KONSTANTINOVA Artileria lernejo generalo Sergej Nikolaeviĉ Butirkin jam de VLADIMIR ILJIĈ LENIN subskribitan plenrajtigon — ke li estas signita dume kiel Estro de Konstantinova Artileria lernejo, sed estinta Kronŝtadta ŝipano Ivanov Ivan Ivanoviĉ havis dokumenton ke li nun estas politika Komisararo de la lernejo.

Venontan tagon en KONSTANTINOVA Artileria Lernejo oni fondis Militistan Revolucian Substabon de la Revolucia urbo Petrogrado.

La ĝenerala Revolucia Ribela Stabo havis sian sidejon en la Instituto de Smolnij sub senpera gvidado de VLADIMIR ILJIĈ LENIN.

Mi iĝis Sekretario de la Militista Revolucia Substabo de la revolucia urbo Petrogrado. — Oni povas facile percepti ke ne nur ĉiutage, sed eĉ ĉiuhore ni havis interrilatojn kun la Ĝenerala Revolucia Ribela Stabo en la Instituto Smolnij — antaŭa Supera Bonedukiteca Instituto por noblaj virgulinaj en Ruslando.

Lenin jam estis informita ke mi tajpas laŭ la blindula metodo de profesoro Mendeleev, per ĉiuj dek fingroj. Oni sendis al la Urba Substabo plenajn pakaĵojn da sekretaj cirkuleroj, kiujn oni devis urĝe multobligi kaj dissendadi al diversaj militistaj unuoj.

Mi tajpas kaj tajpas, forgesante eĉ pri dormado.

Subite militista kuriero transdonas el Estro de la Substabo al mia senpera ĉefo kamarado Krilenko preskaŭ „tutan libron“, kiun oni devas kopii ne malpli ol en 27 ekzempleroj. Ĝi estas necesa por la Unua kunsido de la Revoluciaj Komisararoj - ke ĉiu havu dum kunsido antaŭ si po unu ekzemplero.

La „libro“ estis: „KONSTITUCIJA — Osnovnoj Zakon — ROSSIJSKOJ SOCIALISTIĈESKOJ FEDERATIVNOJ SOVETSKOJ RESPUBLIKI“, do — 1a Konstitucio de Vladimir Iljiĉ LENIN!

Ke pli rapide sukcesu la transskribado — KRILENKO mem anoncas sin kiel diktanto kaj mi kuraĝe komencas tajpi sub diktado en kvin kopioj samtempe, ĉar ni ne havis pli delikatan paperon por pliaj kopioj.

Sed, ho ve! Jam post la kvara parto de la KONSTITUCIO — mia diligenta diktanto jam dormas, ĉar la revoluciaj noktoj stampis per sia sigilo la homajn nervojn.

Mi ĉesis la skribadon, sternis la makulaturon sur la planko kaj kuŝigis mian noblan helpanton — ke li iom ripozu.

Mi daŭrigas la tajpadon sole!

La manuskripto estas kungluita: jen kelkaj paragrafoj — maŝinskribe, jen kelkaj — skribitaj per virina mano, jen kelkaj — per malfacile legebla manskribo de nia

Vladimir Iljiĉ Lenin. Multaj paragrafoj estis prenitaj de Franci Konstitucio, kiujn LENIN mem tradukis siatempe estante en libervola ekzilo.

Jen la TRIA parto de la KONSTITUCIO Sesa ĉapitro — 24-a, 25-a, 26-a kaj . . . subite la 27-a paragrafo de la sama Konstitucio. En mezo de la paragrafo troviĝas unu vorto kiun la kuraĝa tajpisto ne povas deĉifri. — Mi vekigas mian senperan ĉefon kamaradon Krilenko — li eĉ ne moviĝas...

Proverbo diras ke: „Dronanto penas kapti eĉ pajlon!” Same mi tiufoje kaptis eksterordinaran rimedon — mi ekkuraĝis en momento de la malespero telefoni al Instituto de Smolnij . . .

Longe mi devis kvereli kun la telefonistino — ŝi ne deziras ligi min kun la kabineto de VLADIMIR ILJIĉ LENIN, — mi diru unue al ŝi kial estas la bezono urĝa! Heroino! Fin-fine mi rakontas al ŝi la historion.

Parolas Lenin! De granda ekscito mia koro preskaŭ haltas bati. Mi priskribas al Vladimir Iljiĉ Lenin ke mia senpera Estro — kamarado Krilenko dormas en tia forta dormo ke mi eĉ fiaskis lin veki, sed en la 27 paragrafo de la Konstitucio mi renkontiĝis kun unu vorto, kiun mi — neposedante perfekte la rusan lingvon — ne povas deĉifri. Eble ke mi povus ankaŭ tralegi la vorton, sed nekompreneble la signifon de ĝi — mi timas riski kaj eble enlasi en la skribaĵo teruran eraron. VLADIMIR ILJIĉ LENIN ekridetis kaj diris: „La paragrafon mi mem skribis kaj scias ĝin parkere.” „Tie devas esti: poĉinu!” — Kaj tiel estis!

Je honoro de Vladimir Iljiĉ Lenin — fondinto de la III-a Internaciano — Petrogradaj esperantistoj baptis sian Esperanto-Klubon je nomo "III Internaciano".

La Klubo eldonis Esperanto-ŝlosilon — „Kluĉ Esperanto" en la kvanto de 10.000 ekzempleroj kaj semajnan gazeton „Agitanto", kiujn oni presis en tipografio de la Revolucia Militŝiparo en Kronŝtadto. Krom tiuj Esperanto-eldonaĵoj aperis ĉiumonata Esperanto-revuo „Petrograda Informilo", kiun oni presis en tipografio de Ruslanda Akademio de Scienco, 12-a presejo, Vasilevskij Ostrov, IX-a linio, domo Nr. 12, kie siatempe oni presis ankaŭ 8-voluman latvan nacian trezoron „Latvju Tautas Dainas" de Kriŝjanis Barons.

Kiel teknika redaktoro mi havis la mirindan okazon kaj grandan feliĉon kaj samtempe ankaŭ la respondeplenan devon — ĉiun duan vendredon viziti la Instituton de Smolnij, kie Vladimir Iljiĉ Lenin persone informis ĉiujn redaktorojn kaj Klubestrojn pri la plej novaj kaj aktualaj politikaj okazintaĵoj kiel de ni, same ankaŭ eksterlande.

*

La unuan fojon mi vidis VLADIMIR ILJIĉ LENIN la 3-an de Aprilo en Suomistacidomo, kiam li revenis el sia longjara libervola ekzilo. — La petrograda garnizono tutan nokton staris je honora posteno sub gvidado de kolonelo Aleksandr Vladimiroviĉ Selivankin — vicprezidanto de Petrograda Esperanto-Societo „Espero". — Poste sur Placo de Marso apud Somera ĝardeno, kiun ornamas la interesa monumento de Ivan Andreeviĉ Krilov — aŭtoro de la plej belaj fabloj — kun sia bestaro.

La plej grava renkontiĝo de Vladimir Iljiĉ LENIN kun la popolo okazis la 9-an de Majo en la cirko de Ĉinizelli. Kiel la cirko mem, same la tuta placo ekster la

cirko estis plenplena de homoj.

Lenin alvenis per kiras-aŭto. La garnizonanoj krucigis la manojn je viva seĝo kaj sur manoj portis Vladimir Iljiĉ LENIN ĝis la cirka areno, kie antaŭ la loĝio de la orkestro estis starigita provizora, per girlandoj ornamita, katedro.

Vladimir Iljiĉ LENIN parolis longe. Sed en mia memoro ĝis hodiaŭa tago kaŭras nur la belaj gravaj-historiaj vortoj de Lenin, ke:

„Ne nur tiuj estas civitanoj de la Nova Soveta Ŝtato, kiuj posedas Partian Karteton, sed ĉiuj homoj — kiuj per korflamo laboras je interesoj de la Nova Soveta Regno!"

SET-ano estas la nomo de la neregula bulteno de la prepar-komitato de SET en Lančov, kiun eldonadas Kleriga Domo de B. Václavek, redaktas Th. Kilian kaj presas Grafia Jihlava. Ĝi donas utilajn konsilojn al la partoprenontoj de la I-a etapo (14. 7.-27. 7.), kaj de la II-a (28. 7.-10. 8. 1968).

OFICIALA KOMUNIKAĴO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) „solvi la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof", kaj de la unuanima de Komitato de UEA „kiel eble plej baldaŭ" difini tiun solvon; samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UEF) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomacia, jura aŭ politika dokumento, nome:

1. „Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970" = do la garantiantoj estos kvitaj:

A) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon;

B) nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.

2. „Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo"

A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;

B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.

3. „Ni asertas, ke la aŭtomobilo de sro X estis efektive riparata la lastan semajnon"

A) la tasan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭto;

B) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.

4. „Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio"

A) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;

B) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

La Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonintoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj) decidis kaj deklaras, ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur konfirmas kaj kompletigas la rezulton de la voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia eblo de dusenceco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu

decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de lernolibroj de nun konsideros la ĉi suprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio. la 25an de Nov. 1967

G. Waringhien, P. Neergaard, A. Atanasov, R. Bernard, D. Gregor.

Ett lámplingt tilliŝle. (Vhodná příležitost.)

Švédský esperantský svaz nabízí kompletní ročníky svého časopisu od r. 1925 (přibližně) za náhradu poštovného a obalu. Adr. Jan Strönné, Amiralsgatan 36, Malmö C, Švédsko.




En la Silezia urbo Příbor staras kelkaj tabuloj apud la ĉefa strato. La jena, kun s-ano A. Satek, bonvenigas la aŭtomobilistojn-esperantistojn kaj atentigas ilin, ke en la urbo troviĝas la naskiĝloko de la mondfama psikologo Sigismundo Freud, aŭtoro de la t. n. psikoanalizo.

Gazetoj. (Starší časopisy.)

Worker Esperantist, 1967 IV, n-o 187, p. 34

Zájemci o starší časopisy si mohou napsat Workers' Esperanto Movement (SATEB), 27 Argyle Road, Cranbrook, Ilford, Essex, a uvést buď hledaný časopis, nebo zda si přejí ukázková čísla pro propagaci.



La II-a kunsido de Medicina Sekcio de ĈSEK estis kunvokita al Poděbrady por la tagoj 29-30 de junio. Sur la bildo kelkaj partoprenintoj de la I-a en Opava 1967.

Steloj — internacia mono. (Esperantská měna.)

Mondano 1, 1967 III, n-o 1, p. 13-16. 1 fot., 1 tab., lit. 1

V počátcích hnutí byla navržena měnová jednotka „speso“. Universala Ligo vytvořila novou měnu „stelo“, která vyjadřuje cenu určitého množství chleba, prakticky se však rovná čtvrtině holandského zlatého. Existují bankovky a mince v hodnotě 1 st., mince 5, 10 a 25 st. (fot.). Autor navrhuje rozšířit možnost placení touto měnou a) publikováním seznamu osob a institucí, které přijímají takové platy a k jakému účelu, b) uložit v bance protihodnotu 10 000 stel a rozprodat je atd., Kurs v různých měnách podle ročenky UEA 1966.

Jarlibro de internaciaj organizaĵoj. Mondano 1, 1967 III, n-o 1, p. 17-20 Recenze o: *Annuaire des organisations internationales. Yearbook of international organizations.* 10. ed. Bruxelles, Union of International Organizations 1964.

Ročenka obsahuje seznam 1882 organizací, z toho 1470 nevládních, v 18 oddílech. Z oddílu „mezinárodní vztahy“ vypsáno 42, jejichž činnost se týká světoobčanství, míru, mezinárodního porozumění, esperanta apod. Uvedeny adresy a překlad názvu.

G. C. Fighiera: **Esperanto en kongresoj.**

IOE-Gazeto 2. 1967 II, n-o 2, p. 3

Roĉnĉ se ŭĉastnĉi kongresŭ v zahraniĉi pŕes milion lidĉi. Pŕekonĉnĉi jazykovŭch pŕekĉĉezek je nesnadnĉe a drahĉe. (m. j. ŭĉastnĉici se nevybĉirajĉi podle odbornosti, ale podle toho, zda znajĉi jednacĉi jazyky.) Navrhuje se kampaĉnĉ za zavedenĉi esperanta do mezinĉrodnĉich kongresŭ, a to 1. tisku, 2. letĉkem, 3. pŕĉmŭm jednĉnĉm s poŕadatelem a ŭĉastnĉiky. Pak by se mĉlo nĉkolik mezinĉrodnĉich spoleĉnostĉi pŕesvĉdĉit o pokusnĉm zavedenĉi esperanta mezi pracovnĉi jazyky.

Ĉu ekzistos libroj en la XXI-a jarcento?

El la historio de la homaro evidentiĝas, ke ĉiu socio en siaj evoluo kaj progreso dependas de tio, kiel ĝi kapablas certigi la rapidan komunikadon de novaj informoj kaj konoj. Dum centmiloj da jaroj ekzistis nur perbuŝa transdonado de informoj. Per tio la informado estis limigita en spaco kaj tempo. Ĝi estis nepreciza kaj dependanta de la nivelo de la transdonanto. Tiel la informoj deformiĝis kaj senvaloriĝis.

Grandan revolucion alportis la skriba formo de informado. Ekde la momento de ĝia apero estis eble transdonadi informojn sendepende de tempo kaj spaco. La informoj sendependiĝis ankaŭ de la nivelo de la transdonanto kaj ilia daŭro plilongiĝis nemezureble. Tiam komenciĝis la historio de la homaro en la propra senco. El la tuta ĝisnuna evoluo de la homa socio nur la lastaj 6 000 jaroj estas la tempo, pri kiu ni scias diri, kiel en ĝi vivis homo; kiel li pensis, kion faris. Se la skribanto antaŭ kelkaj miloj da jaroj skribis pri siaj emocioj, spertoj ktp., ni hodiaŭ, legante liajn raportojn, kapablas kompreni liajn sentojn, kaj ekkoni liajn situacion, vivmanieron, medion.

Kiam antaŭ 5 000 jaroj la skribistoj de la unua ŝtato en la mondo, postlasinta skribajn dokumentojn, en la urbo Ur en Malgranda Azio, skribis sur argilajn tabulojn, ili ne povis eĉ supozeti, ke pli poste tute ŝanĝiĝos la formo kaj rimedoj de la skribo kaj ke la argilajn tabulojn anstataŭos papiruso.

Malpeza papiruso, enkondukita en Egiptujo, signifis grandan progreson kompare al la pezaj kaj grandaj argiltabuloj. Ege faciliĝis ankaŭ la skriblaboro. La informoj sur la papiruso estis facile transporteblaj kaj konserveblaj. La tuta malnovepoko kun la historio de grekoj kaj romianoj transprenis ĉi tiun inventaĵan kaj ĝis nun informas nin pri sia historio.

De argilaj tabuloj trans papirusrulaĵoj la homaro venis al la formo de presitaj libroj. Kaj same kiel la prahistoria bibliotekisto en la urbo Ur ne povis al si imagi, ke venos io pli perfekta; kiel la egiptoj ne pensis, ke centmiloj da papirusrulaĵoj estos anstataŭitaj per presitaj libroj, same eĉ ni hodiaŭ ne povas diveni, kia sorto atendas niajn bonajn amikojn — la librojn. Tre malfacile ni povas kompreni, ke la libro povos esti anstataŭita per memoro de aŭtomata kalkulmaŝino — komputilo.

Ĉi-rilate ni staras antaŭ la pordo de nova epoko. La homaro ĉiujare produktas tiom da novaj konoj, eltrovoj kaj informoj pri ili, ke minacas danĝero, de ĝi dronos en la inundo de presitaj vortoj. Ni atingis la paradokson, kiun eni povus karakterizi per la renverso de la fama Sokrata sentenco „Mi scias, ke mi nenion scias" je „Ni eĉ ne

scias, kiom ni scias". Kaj ekde la morto de Sokrates pasis nur 2 500 jaroj. Disde la tiama nesufiĉo de scioj ni venis al la situacio, signifanta veran eksplodon de novaj eltrovoj, ke ili minacas fariĝi bremsa por la progreso.

La ĉefa kialo de la nuna stato estas tio, ke la novaj ekkonoj estas publikigataj preskaŭ tute neordigite. Kiom da specoj de literaturfontoj: gazetoj, ĵurnaloj, libroj, patentatestoj, esplorraportoj, normoj, firmaa literaturo, enhavas novajn nociojn, aferojn. En kiom da lingvoj, skribmanieroj, falas ĉi tiu inundo sur la mondon! La fama angla fizikisto Bernai tute serioze asertis, ke ofte pli facile estas ripeti ian esploron ol trovi la literaturan fonton, kiu ĝin priskribas. Tial en Usono en 1959 oni vane elspezis miliardojn pro ripetita esploralaboro. Angloj en la jaro 1962 la perfektan konon de literaturo taksis je 10 milionoj da funtoj. Do kiel solvi la problemon?

Unu rimedo estas la t. n. referatgazetoj. La unua aperis antaŭ 140 jaroj kaj nomiĝis „Pharmazeutisches Zentralblatt". Ĝi ne publikigis novajn artikolojn, sed nur mallongajn raportojn. Hodiaŭ jam preskaŭ en ĉiu fako, precipe en tekniko aperas tre malvaste specialigitaj referatgazetoj.

La dua rimedo estas fondado de informcentroj kaj fakaj bibliotekoj. En tiaj centroj devas labori multaj fakuloj, kiuj per sia laboro ŝparas la tempon de siaj kolegoj en la esploro kaj produktado — industrio.

Sed montriĝas, ke eĉ ĉi tiuj du manieroj estas nesufiĉaj: ili ne povas disvolviĝi tiel rapide, kiel rapide aperas novaj konoj kaj informoj. La statistiko, per kiu mi ne volas enuigi, evidentigas, ke post ĉiuj 10-15 jaroj devus duobliĝi la personaro de bibliotekoj. Do povus veni la tempo, kiam ĉiuj homoj estos bibliotekistoj. Poste jam neniu restos por skribi kaj eltrovi kaj la bibliotekistoj povos ripozi senzorge.

Do nemirinde, ke la okuloj turniĝas al la maŝinoj. La novaj komputiloj famiĝis jam en multaj fakoj de la homa agado: en kosmonaŭtiko, komerco, stirado de produktadprocedoj, sciencaj laboroj ktp. La komputilo de fizikisto Kessler en la Usona Massachusetts Institute of Technology prezentas centron, al kiu ligiĝas centoj da teleksoj (telegrafskribmaŝinoj), lokigitaj en unuopaj laborlokoj de la Instituto. La sciencistoj povas senpere kontakti kun la komputilo kaj ricevadi informojn pri la dezirata problemoj. Oni preparas la eblecon konekti sin helpe de televidaparatoj.

Kaj fine, kion pri la libroj? Estas konata afero, ke ili alportadas sciencajn kaj teknikajn informojn kun grada (3-5-jara) malfruiĝo. Malgraŭ tio ili ankoraŭ longe rajtos vivi kaj restos neanstataŭbla rimedo por lernado, por akirado de la unuaj konoj en ia fako. Ĉiu nova fakulo turnas sin al la gazetoj kaj aliaj informiloj nur post trastudo de la ĉefaj faklibroj en sia fako. Ni povas prave kredi, ke libroj eĉ en la XXI-a jarcento restos grava rimedo por komunikado de informoj, kvankam disvastiĝos ankaŭ aliaj rimedoj por kontentigi ĉiujn interesantojn pri novaj kaj interesaj konoj.

Grandan progreson signifus la envicigo de unusola lingvo en la inform- servon. Ĝi estus sendube Esperanto, kiu havas la plej logikan lingvokonstruon kaj tre bone konvenas al tiu ĉi honora kaj grava tasko.

Ing. Ivan Slávik el Nová Dubnica en Slovakio

Fakvortaron pri kuirarto...

Zájemci o spolupráci na slovníku kuchařského umění, hotelů a restaurací necht' se přihlásí na adr.: Jos. Otta, Nerudova 32, Šumperk.

Rotterdam.

Osmistránkový turistický prospekt světové úrovně vydala rotterdamská cestovní kancelář k 60. výročí tamního esperantského klubu. Na požádání jej zašle V. V. V., Stadhuisplein 19. Rotterdam — 1, Holandsko.

Ciferoj por meditado.

Esperanto, Rev. int. **60**, 1967 VI, n-o 6, p. 102

Z individuálních členů UEA 1966 bylo 14 % nových členů, ale 58 % již před r. 1960. 76 % bylo mužů, 4 % do 22 let. 78 % bydlelo v Evropě, 12 % v Americe, 5 % v Asii, 4 % v Oceánii a jen 1 % v Africe. Mezi novými členy je asi 30 % žen (mezi starými asi 20 %).

INTERNACIAJ KULTURAJ FERIOJ EN JUGOSLAVIO — SOMERO 1968 —

Turisma sekcio de I. O. E. por Jugoslavio (Poŝtfako 213, Zagreb 2) organizas ekde 1968 „internaciajn kulturajn feriojn“ en: BLED, DUBROVNIK, POREC, PRIMOSTEN, ROVINJ kaj JABIJAK. Tiuj ferilokoj trovigas nepre inter la plej allogaj en Jugoslavio.

BLED (1.-15. VI. 1966)

internacia festivalo de pupoteatroj, vesperoj de kanzono, teatro, filmo kaj folkloro, ekskursoj, kurso de Esperanto por komencantoj.

DUBROVNIK (15.-30. VI. 1968)

internacia festivalo de foto-film amatoroj, pupoteatra prezentajo, kanzonvespero, teatroprezentajoj, eks- kursoj, kurso de Esperanto por ko- mencantoj. >

POREC (1.-14. VII. 1968)

internacia universitata arta festivalo, spektakloj donataj ĉefe de gestudentoj: teatrovesperoj, folklorvesperoj, amatoraj kaj tutvespera filmoj, balo, ekskursoj, ekspozicioj pri studenta arto, kurso de Esperanto por komencatoj.

PRIMOŠTEN (15.-28. VII. 1968)

internacia festivalo de teatro, folklorvespero, filmprezentado, amator-filma vespero, kanzonvespero, ekskursoj, kurso de Esperanto por komencantoj.

ROVINJ (15.-30. VIII. 1968.)

internacia festivalo de Esperanto-kanzono, folklorvespero, filmprezentado, teatra vespero, amatorfilma vespero, ekskursoj, kurso de Esperanto por komencantoj.

JABLJAK (31. VIII.-15. IX. 1968.)

rekontiĝo de montogrimpemuloj kaj naturamikoj, kanzonvesperoj, filmvesperoj, teatrovesperoj, amatorfilmaj vesperoj, pupoteatra prezentado, folklorprezentado, ekskursoj, kurso de Esperanto por komencantoj.

EL NIAJ RONDETOJ

Plua sciigo el Modřany

La 10-an de oktobro la Esperanto-rondeto en Modřany inaŭguris siajn jam tradiciajn aŭtunajn Esperanto-kursojn per prelego de inĝeniero Rŭcker, prezidanto de la rondeto kaj ankaŭ la Virina Komisiono de ĈSEK estis invitita. Kompreneble ke la komisiono ĉeestis multnombre kaj la vespero havis instru-amikan ĥarakteron.

Post la prelego de inĝ. Rŭcker, kiu skizis la historion de la lingvo ekde la Babilon-turo trans Comenius ĝis d-ro Zamenhof, substrekinte la gravecon kaj simplecon de la lingvo, la VK vicigis du poemetojn de samideano Arturs Kubulnieks el Litovio, kun kies rondeto de infanoj la komisiono estas en daŭra kontakto. Estis senditaj kelkaj amase subskribitaj bildkartoj al geamikoj en eksterlandon kaj ĉi-foje la unuan fojon ne ĉeestis la ĵus forpasinta samideanino Vlasta Křrenková, kies rememoro estis honorita per duminuta silento de ĉiuj ĉeestantoj. Ŝi estis aktiva kunlaborantino, vic-estrino de Virina Komisiono.

Post deklamo de samideanino Elen Ciganeková instruisto Kohoutek rakontis interese pri sia vojaĝo kaj amika esperantista renkontiĝo en Pollando.

La vespero estis kronita per anonco de pluaj tri kursoj komenca, daŭriga kaj konversacia, demonstranta viglan aktivecon de Esperanto-rondeto en Modřany.

I. výročí Esperantského klubu v Jablonci

V sobotu 13. ledna oslavili jablonečtí esperantisté své výročí založení svého klubu při Kulturním a společenském středisku v Jablonci. Svoji celoroční činnost zhodnotili na slavnostní schůzi, uspořádané v nové esperantské klubovně v Rýnovické ulici. Přes nepříznivé počasí a nesjízdné cesty se slavnostní schůze zúčastnila i 25-člená delegace z Polska. Také z NDR přijeli členové esperantských kroužků ze Zittau a Olbersdorfu, se kterými jsme navázali přátelství při podzimním zájezdu 30ti člené skupiny jabloneckých esperantistů na setkání v Olbersdorfu — i když někteří dojeli s několikahodinovým spožděním nebo až příští den.

Slavnostní schůzi zahájil ředitel Kulturního a společenského střediska s. Ječný, který uvítal hosty, zhodnotil činnost esperantského klubu a předal jeho zástupcům čestné uznání za vzornou práci. Po referátech zástupců jabloneckého klubu a vedoucích delegací z Polska a NDR byly předány dary klubům. Také všichni účastníci obdrželi jako dárek vložku s esperantskými i jinými tiskovinami a fotografiemi z Jablonce. Na závěr oficiální části schůze byla slavnostně podepsána společná dohoda o trvalé spolupráci esperantistů z oblastí Jablonec, Jelenia Góra a Zittau.

Potom následovalo pohoštění a přípitky, po kterých se rozproudila srdečná „Mezinárodní“ zábava. Prvně zazpívali jablonečtí několik písní ze svého repertoaru, potom zase polští hosté a za chvíli již se bavili a zpívali Češi, Němci i Poláci, v onom nedefinovatelném přátelském ovzduší, které se dá vytvořit jenom mezi esperantisty. Hostům byl předveden také barevný film o Mezinárodní výstavě bižuterie, v rámci

kterého bude letošní „Mírové setkání esperantistů 3 zemí“, jehož se naši přátelé z Polska i Německa chtějí zúčastnit.

Zábava byla dlouhá: o to později se druhý den vstávalo, ale i tak zbylo ještě dost času na prohlídku města i přátelské posezení. Před odjezdem polských přátel bylo ještě dlouhé loučení na autobusovém nádraží — s hudbou a zpěvem, se kterým naši přátelé také odjížděli. Potom ještě rozloučení s přáteli z NDR se slibem: v dubnu se znovu všichni setkáme v Jelenie Góře, v květnu v Zittau a v srpnu znovu na našem setkání v Jablonci.

M. Hruška

Korespondi deziras

Johano Sikora, (Kraków-2, Ul. L. Solskiego 22/8, Pollando), 20-jara studento en Ŝtata Teknika Lernejo (elektraj ciferaj maŝinoj), interesiĝas pri muziko, fotoarto, junularaj problemoj, ĉiutaga vivo en via lando, turismo; kolektas bildkartojn, fotoalbumojn, diskojn kun distra muziko aŭ dancmuziko.

Nikola Atanaska kaj Georgi Dimitrov Gjurnev (25—, 21—, 16-jaraj) Baldevo, distr. Blagoevgradski, Bulgario, interesiĝas pri aŭtoj, sporto, gramofondiskoj, modo, medicino, moderna muziko, sonbendoj, tranzistoroj, fotoj, filmoj, teatro, turismo, p. k. kaj p. m. Respondo certa.

Boguslaw Sobol, 33-jara oficisto, Mokra Prawa 61-a P-ta Skierniewice, woj. Lodzkie, Pollando, interesiĝas pri sporto kaj turismo; kolektas p. m. kaj bildkartojn.

Wieslava Adamiec, 20-jara studentino interesiĝas pri literaturo, film- kaj fotoarto, fremdaj lingvoj, sporto, junularaj problemoj, turismo, ĉiutaga vivo; kolektas p. s., b. k., diskojn. Adreso: Ul. A. Mickiewicza 22, SKIERNIEWICE 1, Woj. Łódzkie, Pollando.

OSTRAVA-PORUBA

La rondeto de esperantistoj, kiu dum 12 jaroj ekzistis ĉe Kultura domo de Bytostav, transiris en majo 1967 al Klubo de laboruloj de ŝakto „La Venka Februaro.“ La malferman kunvenon en moderna domo de la Klubo, la 15-an de majo ĉeestis 35 gesamideanoj kaj gastoj el diversaj partoj de Ostrava. En entreprena gazeto de Bytostav „Nová Ostrava“, pri la ŝanĝo aperis adiaŭa letero, kiu koncize resumis la ĝistiaman agadon de la rondeto. La ŝanĝo okazis pro likvido de la Kulturdomo de Bytostav. — La Klubo de laboruloj de ŝakto „La Venka Februaro“ posedas 20-minutan filmon pri agado de la Klubo. Por tiu filmo estis pretigita Esperanta sonbendo kun nova muzika akompano, kun helpo de anoj de sonbenda rondeto de la Klubo. Dum ferioj vizitis la rondeton f-ino Jacqueline Chafd'homme el Parizo, f-ino Hanjo Glöckner el Pirna en GDR, kaj s-ano Csomka Lajos el Budapeŝto. — Al la aŭtuna kurso por komencantoj aliĝis 18 partoprenantoj, la kurson finis 8. Propagando estis farita per belgustaj afiŝoj, pendigitaj en tuta urbo Ostrava, kaj per 5 memstaraj grandaj afiŝoj (unu sur domo de la Klubo, 4 sur la ĉefa Lenin-strato). — Ekde oktobro 1967 la Klubo envicigis Esperantajn konversaciajn vesperojn (krom la anglaj, francaj kaj germanaj) unufoje ĉiumonate. La konversaciaj vesperoj estas

anoncataj sur afiŝoj de la Klubo kune kun ties alia programo, en belaj ĉiumonataj programkajeroj de la Klubo, en ĉiumonata Ostravský kulturní zpravodaj, en iuj lokaj gazetoj, kaj ankaŭ estas dissendataj invitiloj al esperantistoj en Ostrava kaj al rondetoj en Nordmoravia regiono. Partoprenas 12-23 aŭskultantoj. La ĝisnunaj temoj estis: Julio Baghy, granda poeto, Esperanto-movado en USSR, Letervespero, Simboloj de esperantismo, Esperantistoj ridas (pri Raymond Schwartz), Sveda laboristo en nia lando (pri Gösta Henriksson en Malmö), Lingvaj respondoj de d-ro Zamenhof, kaj por majo 1968 estas planita prelego de s-ano Drahomír Kočvara, membro de ĈSEK, pri perspektivoj de Esperanto-movado en ĈSSR. Kelkfoje estis projekciitaj Esperantaj filmoj (Fiat, Novzelando, Aŭstralio), kaj diapozitivaj (Hungario — s-ano Kočvara Drah., USSR — s-ano Frant. Chvátal, Aŭstrio kaj Svislando — s-ano Ladislav Němec). Letervespero, okazinta la 18-an de dec. 1967, havis neatenditan sukceson: ĝisdate venis 45 kontribuoj el 19 landoj, sed Hungara Vivo aperigis anonceton pri ĝi nur fine de decembro kaj ŝanĝis la daton ĝis februaro. Sekve venis ankoraŭ 37 kontribuoj. En „Práce" aperis artikolo pri la letervespero la 19-an de dec. kun ne kompletaj indikoj. — Ĉe jarkunveno la 4-an de marto 1968 estis s-anino Lydie Klegová elektita por reprezenti la rondeton en la komitato de la Klubo. S-anino Milada Mikolajková zorgas pri biblioteko kaj partoprenis per voĉlegado ĉe pretigo de sonbendo por la filmo pri la Klubo, ankaŭ recitadas dum konversaciaj vesperoj. — La rondeto laboras sen sekretario, oficistinoj de la Klubo de laboruloj modele kunlaboradas, pretigante kaj dissendante invitilojn kaj aliajn korespondaĵojn. Sur koridoro de la klubdomo kaj en trairejo de kinejo Dukla estas vidigataj materialoj pri Esperanto. — Semajnaj kunvenoj de la rondeto okazas ĉiulunde je la 19-a horo.

Adolf Staňura.

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU — INFORMOJ DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO - KOMITATO. — Vydává — Eldonas: Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Rediguje — Redaktas: Dr. L. Izák — s redakčním výborem — kun la redakta komitato: J. Cíhová, Ing. Ed. Felix, Zd. Hršel. O. Kníchal, M. Lukáš, Dr. T. Pumpr, Ing. Fr. Sviták, Ed. V. Tvarožek, J. Vondroušek. Tisk — Preso: Tlačiarne Slov. nár. povstania, Martin R4/59 - anKS NVP